

Sendu vian aliĝilon kun via pago preferinde antaŭ 1a majo 2010 al:
Ed Robertson, 52 Easter Drylaw View, Edinburgh, EH4 2QP, Skotlando
 rete: ed-robertson@teleosvet.co.uk
 tel.: +44 (0) 131 332 9803 (h) / +44 (0) 7970 156 549 (p)

Aliĝilo

Nomoj:
 Adreso:
 Urbo:
 Lando:
 Telefono:
 Retpoŝto:

NOTU, KE LA PREZOJ NE INKLUZIVAS LOĜADON
Estas multaj eblecoj en kaj apud Berwick-upon-Tweed.
Aliĝintoj ricevos detalojn.

Bv. hoketi aŭ enmeti la mendatan kvanton

Tuta kongreso inkluzive bankedon k ekskursojn (£80/€80)

Tuta kongreso sen bankedo/ekskursoj (£40/€40)

Ekskurso al Lindisfarne (£10/€10)

Bankedo sabatvespere (£20/€20)

Ekskurso lunde (£20/€20)

Unutaga kotizo (£15/€15): Vendredo / Sabato / Dimanĉo

Sub 16 j. senpage. Gejunuloj sub 26 j. rajtas peti subvencion de NoJEF
<http://www.esperanto-gb.org/nojef/index.htm>

Mi pagas: ĉeke / al UEA-konto **eask-l** (forstreku)

Vegetarano? jes / ne / ne gravas (forstreku)

Mi aldone inkluzivas donacon de Totala sumo

(Ĉekoj estu pageblaj al „**Esperanto-Asocio de Skotlando**“)

105a Skota kaj Internacia Kongreso de Esperanto



*en The Maltings Theatre and Arts Centre
 Eastern Lane, Berwick-upon-Tweed
 Skotlando?/Anglio?
 4a ĝis 7a de junio 2010*

Bonvenon al la plej alta kongresnumero en Esperantio!

La kongreso organizita ĉiujare de 1906 de Esperanto-Asocio de Skotlando okazos en 2010 en **Berwick-upon-Tweed**, agrabla urbeto sur la landlimo inter Skotlando kaj Anglio. (Oni ne konfuzu *Berwick-upon-Tweed* kun pli malgranda skota urbeto *North Berwick*, 65 km. for, kiu **ne** rolos en nia kongreso). Eventoj je la lundo, la 7a de junio okazos en *Dunbar*, en graflando *East Lothian*, oficiale en Skotlando mem, urbeto facile atingebla de *Berwick-upon-Tweed* per trajne.

Berwick-upon-Tweed estas antikva marborda urbo, kun nuna loĝantaro de proks. 12000. La nomo signifas aŭ “hordeofarmo” aŭ “hordeogolfo”. Post la romia okupado, la regionon dominis britoj, kiuj parolis lingvon parenkan al la nuna kimra, kaj sekve venis unue enmigrintoj de la nuna Germanio, kiuj alportis la anglan lingvon, kaj poste danoj. En 1018 la urbo fariĝis parto de Skotlando, kaj laŭgrade ĝi kreskiĝis, kaj dum la 12a jarcento estis grava haveno, kaj la kvina urbo de Skotlando laŭ nombro de enloĝantoj. En 1216 angla armeo sub la gvidado de Reĝo John tute detruis la urbon. Denove en 1296 okazis pogromo fare de armeo de angla reĝo, en kiu mortis 8000 enloĝantoj. La urbo dum la sekvaj jarcentoj ofte fariĝis garnizono kun grandioza kastelo (restas nun nur malgranda parto) kiun uzis anglaj armeoj survoje por invadi Skotlandon. La urbo antaŭe estis grava

loko por ŝipkonstruado. Fiŝkaptado, precipe de salmoj, estas ankoraŭ grava okupo.

Berwick-upon-Tweed estas facile atingebla aŭtomobile laŭ la ŝoseo A1, kaj fervoje laŭ la grava linio *Aberdeen - Dundee - Edinburgh - Berwick-upon-Tweed - Newcastle - York - London*. Ekzistas multnombraj aviadilaj ligoj al la grandaj urboj *Edinburgh* kaj *Newcastle*, kiuj situas ambaŭ samdistance (100 km.) de *Berwick*. Regulaj trajnoj veturas de tiuj urboj al *Berwick* en vojaĝo de nur 45 min., kaj precipe kaze de la vojo de *Edinburgh* al *Berwick-upon-Tweed*, tra tre bela pejzaĝo. Pramŝipoj aldone veturas de la europa ĉeftero kaj al *Newcastle*, kaj al *Rosyth*, apud *Edinburgh*.

En kiu lando estas *Berwick-upon-Tweed*? Dum preskaŭ 500 jaroj la urbo regule interŝanĝiĝis inter Skotlando kaj Anglio. Kiam la tronoj de la du landoj unuiĝis en 1603, Reĝo James Ia (de Anglio)/VIa (de la skotoj) diris dum vizito al la urbo, ke ĝi apartenas nek al Skotlando, nek al Anglio (ke ĝi tamen estas reĝa posedaĵo, li ja emfazis).

Berwick estas nun oficiale (depost 1885) en la plej norda graflando de Anglio, *Northumberland*, kaj situas 4 km. sude de la nuna skota landlimo. Kulture tamen, *Berwick* havas fortajn ligojn kun Skotlando: kaj la loka futbala teamo, kaj la loka rugbea teamo ludas en la respektiva skota ligo por la koncernaj sportoj. En 2004, opinisondo farita de televid-kompanio trovis majoritaton de enketitaj loĝantoj de la urbo kiuj preferus se *Berwick-upon-Tweed* estus denove parto de Skotlando.

Ĉu *Berwick-upon-Tweed* ankoraŭ militas kontraŭ Ruslando? Fakte, ĉi tio estas mito, kvankam ofte ripetata mito. Pro la fakto, ke la statuso de la urbo estis necerta/disputata, ĝi jen aperis, kaj jen ne aperis en listoj de la posedaĵoj de la monarĥo, kiel ekzemple en deklaroj pri milito aŭ traktatoj de paco. Leviĝis la aserto, ke *Berwick-upon-Tweed* listiĝis en la deklaro de milito inter Britio kaj carisma Ruslando en 1853, sed ke la urbo ne aperis en la posta pactraktato de Parizo en 1856, kiu metis finon al la krimea milito. Kaj do, estas asertite, ke *Berwick-upon-Tweed* restas en stato de milito kontraŭ Ruslando.

Por definitive forigi tiun 110-jaran “malpacon” inter la urbo kaj

Ruslando, (dum kio neniu rezulta milita agado fakte okazis) soveta oficialulo vizitis la urbon en 1966 por subskribi pactraktaton kun la tiama urbestro Robert Knox, kiu laŭdire anoncis, ke “la rusa popolo nun dormu trankvile en siaj litoj”.

Iuj argumentis, tamen, ke Knox ne rajtas koncerni sin oficiale pri eksterlandaj aferoj, kaj ke do, la moderna pactraktato ne validas. Tamen, dum la 1970aj jaroj fariĝis klare al esplorantoj pri historio, ke kvankam *Berwick* ne menciitas en la Traktato de Paris, ĝi ankaŭ ne estas menciita en la pli frua militdeklaro, kaj do ciaokaze neniam troviĝis en stato de milito kontraŭ Ruslando. Rusaj samideanoj povas do sendanĝere viziti nian kongreson kaj estos ege bonvenaj!

Loĝado ne inkluziviĝas en la kongreskotizo, kaj partoprenantoj devas fari proprajn aranĝojn, kaj aliĝintoj ricevos liston de la multaj eblecoj haveblaj en kaj apud la urbo.

La gastparolanto de la kongreso estos **Jakvo Schram** de *Antwerpen* en Belgio, kaj la programo inkluzivos ion por ĉies gusto: prelegoj, pli leĝeraj eroj, kaj ekskursoj. Ni faros gvidatan piediradon tra la urbo por vidi kaj la historiajn lokojn, kaj aldone la stratscenajn temojn de la pentraĵoj de la artisto **Laurence S. Lowry** (1887-1976) faritaj dum siaj ferioj en *Berwick*.

Ni veturos al la apuda insulo **Lindisfarne** (alinome “Holy Island” - sankta insulo), atingebla kiam la tajdo permesas, historie grava kiel la antikva lulilo de kristanismo en Britio. London ni iros al la skota urbeto *Dunbar*, 22 min. for per trajne, unue al la naskiĝloko de la frua ekologio-kampanjanto **John Muir** (1838-1914), kiu multon faris por protekti sovaĝejojn en Usono. Poste ni iros al apuda bierfarejo por gustumi la faman lokan bieron **Belhaven**..

Diversaj aliaj allogaĵoj ekzistas por tiuj, kiuj volas pasigi pli da tempo en la regiono antaŭ aŭ post la kongreso. Naturamantoj povas vidi la riĉan variecon de marbirdoj kaj enlande, rabobirdoj. Aldone estas multege da eblecoj por piedirado, aŭ vizitado al la abundaj kasteloj en la regiono, aŭ al ejoj de la Romia heredaĵo.

Do, la Esperanto-Asocio de Skotlando varme bonvenigas vin al nia 105a kongreso!!! (vidu aliĝilon dorse)